

FALSAJ INFORMOJ PRI LA KRONA VIRUSO EL RUSLANDO

Kiel certaj aŭtokratiismaj ŝtatoj bagateligis aŭ prisilentis la historian pandemion de la jaro 2019/2020. Sed ankaŭ aliaj landoj (aŭ registaroj) disvastiĝas strangajn onidirojn kaj praktikas reciprokajn suspektojn kaj akuzojn.

Ekde la komenco de la krona viruskrizo, kiu furoras kiel pandemio en la mondo, Eŭropa Unio intensigis la observadon de falsaj novaĵoj en la interreto kaj malkovris signifan misinforman kampanjon flanke de rusaj ŝtataj amaskomunikiloj kaj de agantoj ligitaj kun la Kremlo. Ĉi tiu kampanjo celas plifortigi la konfuzon, panikon kaj timon, konstatas interna papero de la Strategia Komunika Fako de la Eŭropa Servo pri Ekstera Agado (SEAE), kiu estis havigita al la germana gazeto *Tagesspiegel*.

La celoj de la misinformado de la Kremlo estas pliakrigi la krizon en okcidentaj landoj, precipe subfosadi la publikan konfidon je la naciaj sansistemoj kaj disdividi la sociojn. Ĉi tiuj klopodoj verŝajne konformas al la pli ampleksa strategio de la Kremlo, nome klopodi detruai la eŭropajn sociojn de interne per misuzado de iliaj malfortoj kaj dividoj.

Vera Jourová, ĉeĥa Komisararo pri EU pri justeco, protektado de konsumantoj kaj egaligo, diris al la germana gazeto *Die Welt*, ke la „falsa informado pri la krona viruso multe kreskas“ kaj ke la celo de tiu kampanjo estas malstabiligi la okcidentajn sociojn per misinformado, sed ankaŭ plifortigi ekzistantajn bildojn pri ima-gablaj malamikoj kaj misinflui elektojn.

La Eŭropa Servo pri Eŭropa Ekstera Agado (SEAE) taksis en sia raporto, kiu havas la nomon „Kovid-19-misinformado“, kiel tiu afero aspektis en la pasintaj semajnoj. Josep Borrell, estro pri ekstera politiko de EU, parolis pri „pandemio de informoj“. Laŭ la brusela raporto, precipe rusaj amaskomunikiloj inundas la okcidentajn ŝtatojn per „fabeloj“ pri la krona viruso.

La plej aŭdacaj mensogoj pri la viruso, kiuj nuntempe disvastiĝas en rusaj amaskomunikiloj kiel *Sputnik*, *Rossija 24* aŭ *RT (Rusio Hodiaŭ)* estas, inter alie, ke la viruso ne eksplodis en la ĉina urbo Vuhano, sed en iuj laboratorioj dise tra la mondo, precipe en Usono kaj Britio, kie ĝi estis kreita kiel biologia armilo kaj alportita al Italio pere de „Gladio“, la terorisma reto de NATO,¹ finfine por malfortigi Rusion. Al tiu speco de misinformado apartenas ankaŭ la aserto, ke la Ŝengen-zono, kiu dume fermis siajn limojn, ne plu ekzistas, ke ĉiuj eŭropanoj estas en kvaranteno kaj ke nur rifuĝintoj rajtas libere moviĝi. Aŭ: Iu paralela ŝtato utiligas la kronan viruson por kontroli la tutan loĝantaron.²

Ekde la 22a de januaro 2020 la "Orienta StratCom-Laborgrupo" dokumentis entute 80 kazojn de misinformado pri la kronviroza pandemio en rusaj ŝtataj amaskomunikiloj aŭ fare de agantoj lojale ligitaj kun la Kremlo. Ekzemple en radioelsendo de la rusa stacio *Vesti FM* oni asertis, ke en Germanio mankas kvalifikataj kuracistoj por kontraŭbatali la kronan viruson. *News Front* raportis en la hispana lingvo, ke Kovid-19 povus esti parto de hibrida usona milito kontraŭ Ĉinio.

Laŭ la Eksterlanda Servo de EU, rusaj amaskomunikiloj ankaŭ preparas diversajn mesaĝojn por malsamaj celgrupoj. „Novaĵoj celantaj la enlandan rusan publikon priskribas la viruson kiel formon de eksterlanda agreso“, skribas la aŭtoroj. „Novaĵoj celantaj internacian publikon ĉefe temigas konspirajn teoriojn pri „tutmondaj elitoj, kiuj uzas la viruson por propraj celoj.“ En eksterlando, la koncernajn publikajn diskutojn en la rusa televido, en kiuj partoprenas diversaj „fakuloj“, kiuj estas engaĝitaj de la Kremlo por trakti la aktualajn temojn el propra vidpunkto, oni povas spekti aŭ en la kanalo *RTR Planeta* aŭ en la interreto. Kvankam ili ŝajnigas sin seriozaj kaj objektivaj, tiuj polemikaj programeroj, gvidataj de la plej kapablaj demagogoj de la rusa ĵurnalismo, ofte postlasas la impreson, ke ili estas nura parodio de samtype kopiitaj okcidentaj elsendoj kaj ke ili havas la solan celon misfamigi Eŭropon, Ukrainion kaj parte ankaŭ Usonon.³

¹ Vd. <https://euvsdisinfo.eu/report/the-most-powerful-virus-has-been-brought-to-italy-by-gladio-natos-secret-terrorist-network>.

² La kolekton de la misinformoj kaj mensogoj disvastigitaj de rusaj amaskomunikiloj vd. sub <https://euvsdisinfo.eu>.

³ Vd. ekzemple: Вечер с Владимиром Соловьевым, Вести недели с Дмитрием Киселевым ай 60 минут. Темы недели.

Cetere, konspiraj teorioj estas uzataj ankaŭ en la landoj de okcidenta Balkanio (Albanio, Serbio, Montenegro, Kosovo, Bosnio kaj Hercegovino, Norda Makedonio). Laŭ la Eksterlanda Servo de EU, la celo povus esti senkreditigi politikajn kontraŭulojn aŭ influi la venontajn elektojn en Serbio kaj Norda Makedonio. Samtempe, ĉi tiuj teorioj ankaŭ povas nutri emociojn kontraŭ ekstereŭropaj migrantoj en la koncerna regiono.

Sed ankaŭ Pekino aktive partoprenas en la misinformaj kampanjoj. Laŭ la sama EU-raporto, ankaŭ Ĉinio intence uzas falsajn informojn por propagandaj celoj. Populara rakonto en sociaj amaskomunikiloj estas, ke la Okcidento ekspluatas la viruson por damaĝi Ĉinion kaj disvastigi kontraŭ-ĉinan senton; pro tio Okcidento devas pardonpeti al Ĉinio kaj la ĉina popolo. Male, la Okcidento, kaj precipe Usono, devas danki Ĉinion pro la rapida limigo de la viruso, dum la Okcidento agis tro malrapide kaj nun estas en mizero. Alia fabelo estas, ke Ĉinio kaj precipe la nekritikebla partiestro Xi Jinping, ĉirkaŭ kiu oni praktikas kulton de la persono, faris heroan laboron en la kontraŭ-batalado de la viruso – kio ankaŭ pruvas, ke centrisma ŝtato povas trakti tiajn krizojn multe pli efike ol demokratiaj landoj, ĉar ekzistas pli da kontrolo. La vero estas, ke la ĉina registaro unue mem kaŝis la eksplodon de la epidemio⁴ kaj poste asertis, ke la viruso estis enkondukita probable de usonaj sport-soldatoj dum iu armea festivalo en Vuhano, kiuj loĝis en hotelo nemalproksime de la koncerna Huanan-merkato. Por eviti malbonigon de sia reputacio, Pekino forcenzuris ciujn men-ciojn, kiuj rilatas al la supozata eksplodo de la viruso en Vuhano kaj en Ĉinio mem.⁵

Aventuraj falsaj informoj originis ne nur el Ruslando aŭ Ĉinio. La nobelpremiito kaj kunmalkovrinto de la aidosa viruso Luc Montagnier surprizis la francan televidon per la aserto, ke Sars-CoV-2 estas viruso artefarite produktita en la laboratorio, kiu entenas erojn de la aidosa viruso. Sed aliaj sciencistoj rapide povis kontraŭpruvi tiun teorion.

Falsaj informoj, kiuj cirkulas en la reto, povas esti ankaŭ alitipaj, kaj, ekzemple, konsisti el jenaj rekomendoj: Utiligi blankigilojn, manĝi ajlon aŭ trinki brandon, kio laŭdire helpas kontraŭ la krona viruso, dum la aserton lavi la manojn oni konsideras tute senutila. La viruso estas sendanĝera kaj povas esti ĉesigita per salo en kvar tagoj. Ktp.⁶

En daŭrigo de la supre prezentita raporto de la Strategia Komunika Fako de la Eŭropa Servo pri Ekstera Agado, kiu plendis pri la disvastigo de falsaj novaĵoj en la interreto fare de Ruslando, la Ekstera Servo de EU riproĉis ankaŭ al Ĉinio, Irano kaj Sirio, ke en tiuj landoj oni disvastigas diversajn falsajn informojn kaj konspirajn teoriojn lige kun la kronviroza pandemio, kun „oficiala ŝtata kaj registara subteno“. La raporto de la *Kampanjo EU vs Disinfo*, kiu estis publikigita la 24an de aprilo, koncernas la rezultojn de analizo farita inter la 2a kaj 22a de aprilo 2020 kaj baziĝas sur ĝenerale alireblaj publikaj informoj. Josep Borrell, la EU-komisiito pri eksteraj rilatoj, jam delonge parolas pri „tutmonda lukto de la rakontoj“ dum la kronviroza krizo. En tiu raporto estas inter alie skribite, ke la Kremlo subtenas falsajn informojn pri la krona viruso, kiuj cirkulas en la sociaj retoj, eĉ tiam, kiam ili kontraŭdiras la rekomendojn de la Monda Organizaĵo pri Sano. Per tiu maniero la Kremlo celas unue subfosi la reagon de EU al la pandemio, due kaŭzi konfuzon inter la homoj pri la origino kaj la sekvoj de la krona viruso.

Kiel kutime, la rusa gvidantaro rifuzis la akuzojn de EU pere de Dmitrij Peskov, la fifama oficiala parolisto de la Kremlo. Ankaŭ diplomatoj de Pekino, kiuj vidas nenian kulpon de Ĉinio, furioze reagis kontraŭ la kritika EU-raporto pri la laŭdira misinforma kampanjo de Pekino.⁷ Laŭ iuj informoj, la ĉinoj eĉ postulis de EU-oficistoj haltigi aŭ almenaŭ mildigi la koncernan raporton (kion la parolisto de Borrell verve neis). Konkrete tio signifas, ke la ĉinoj preferas eviti mencion de Vuhano en ligo kun la origino de Kovid-19.⁸ Ĉu la ĉinoj tamen atingis sian celon? Bart Grothuis, liberala EU-deputito el Nederlando, postulis de Borrell klarigi la aferon.⁹

⁴ Vd. <https://www.derbund.ch/so-vertuschte-china-das-virus-583806407705>.

⁵ Ekzemple en iu artikolo verkita de la EU-ambasadoroj kaj publikigita en la gazeto *China Daily* (vd. <https://www.welt.de/politik/ausland/article207811289/Coronavirus-China-zensiert-Gastbeitrag-von-Botschaftern.html>).

⁶ Vd. <https://www.welt.de/politik/ausland/article207070843/Corona-Fake-News-Russland-und-Chinas-neues-Propaganda-Werkzeug.html>.

⁷ Vd. <https://www.derbund.ch/starker-druck-aus-pekung-413399140913>.

⁸ Vd. <https://tebase1.ch/2020/04/25/eu-wirft-russland-und-china-fake-news-kampagnen-vor/?channel=105105>. La kolekton de la misinformoj kaj mensogoj disvastigitaj de rusaj amaskomunikiloj vd. sub <https://euvsdisinfo.eu>.

⁹ Vd. https://www.nzz.ch/international/coronavirus-china-soll-kritik-der-eu-verhindert-haben-ld.1553775?mktcid=nled&mktcval=102&kid=_2020-4-28&trco=.

La nekutime klara elpaŝo de Bruselo havas evidentan kialon: Multaj eŭropanoj ankoraŭ bone memoras, kiel la Kremlo nigrepentris la bildon de Eŭropo, kiam ĝi estis preskaŭ rando de la kolapso okaze de la krizo pro la rifuĝintoj en la jaro 2015 kaj kiel Moskvo subtenis la kontraŭ-eŭropajn politikajn fortojn. Laborgrupo, kiu devis serĉi kaj analizi la rusan misinformadon, estis kreita de la Eŭropa Servo pri Ekstera Agado en 2015 sub la influo de la rusa interveno en Ukrainio kaj de la ĝin sekvanta ondo de falsaj sciigoj el Ruslando.

Rusa misinformado tra hispanaj kaj litovaj kanaloj

Ankaŭ okulfrapas, ke pluraj el ĉi tiuj misinformaj kampanjoj celas precipe Hispanion kaj Italion, la du landojn, kiuj estis plej draste trafataj de la krona viruso en Eŭropo. Kaj la propagandaj rimedoj de Rusio efektive trovas akcepteman publikon: Kiel raportis la Eŭropa Servo pri Ekstera Agado, la hispana servo de la stacio *RT* estis uzata en tiu tempo pli ol 6,8 milionoj da fojoj en Fejsbuko, Tvitero aŭ Reddit-o por distribui ĉi-koncernajn misinformojn en la hispanlingvaj sociaj retoj, per kio ĝi preskaŭ atingis la frekvencon de *Washington Post*.

Fine de januaro tia informo aperis ankaŭ en la retejo de la litova gazeto *Kauno Diena*, en kiu estis raportite, ke en Litovio troviĝis usona soldato, kiu estis infektita de la viruso. La ĵurnalo poste raportis, ke la koncerna teksto estis atakita de hakisto.¹⁰ La intence diskonigita falsa informo tiel reaperis ankaŭ en aliaj paĝoj en la litova, angla kaj rusa lingvoj. Oficiala parolisto de la litova armeo klarigis, ke ĉi tio celas senkreditigi la aliancantojn de la balta ŝtato kaj ke la publiko estu instigata agiti kontraŭ ĝi. Cetere, same disvastiĝis la onidiro, ke NATO-soldatoj enkondukas la viruson en la Baltajn Ŝtatojn okaze de la granda armea ekzerco "Defendanto 2020". Pro la pandemio tiu ĉi ekzerco estis grandparte nuligita.

Germanaj fakuloj pri sekureco vidas tre profesion manieron kaj insidan narativon, kiujn la rusa misinforma kampanjo aplikas. La ŝtate kontrolataj agentejoj de Rusio provas disvastigi falsajn informojn tra la eksterlandaj amaskomunikiloj kaj sociaj retoj de la mondo por montri tutsimple, ke la Okcidento estas malbona kaj Rusio bona. Multaj homoj en Ruslando, kiuj rigardas precipe la ŝtatan televidon, kredas tiun feliĉan mesaĝon de la rusa propagando kaj pensas negative pri Eŭropo. Tiel, ankaŭ la kronviroza krizo kiel aktuala evento estas utiligata de la rusa propaganda aparato kiel parto de la politika strategio de Moskvo (t.e. Putin), kiu sen havi skrupulojn uzas ĉiajn rimedojn de la kontraŭ-okcidenta agitado por akiri plian mondan influon. Kiel dirite, Moskvo rifuzas ĉiajn tiajn riproĉojn.

Kion oni povas fari en Eŭropo kontraŭ tia misinformado? La parolisto de la menciita EU-fako alvokis la civitanojn ekzakte ekzameni la fonton de tiaj novaĵoj kaj kredi nur tiajn informojn, kiuj estas fidindaj kaj kredindaj.¹¹

Kiel iuj ŝtatestroj klopodis bagateli la pandemion aŭ faris ŝercojn pri ĝi

En Ĉinio la nombro de viktimoj estis verŝajne multe pli alta ol oficiale indike de Pekino. En Okcidento oni dubis pri la vereco de la oficiale komunikitaj ĉinaj ciferoj kaj suspektis, ke Ĉinio celis kaŝi la epidemion.¹² Poste Pekino korektis la ciferojn de Vuhano.¹³ La mortintoj estis proklamitaj kiel martiroj.

Estas okulfrape, ke krudaj, cinikaj kaj potencavidaj naciismaj (duon-)aŭtokratoj kiel Xi Jinping, Putin, Lukaŝenko, Vuĉić, Orbán, Trump, Bolsonaro, Erdoĝan k.a., kies ideologioj entenas elementojn de faŝismo aŭ komunismo, klopodis bagateli aŭ prisilenti la krizon aŭ disvastigi falsajn in-formojn.

¹⁰ Laŭ Vikipedio: kodumulo.

¹¹ Laŭ <https://www.tagesspiegel.de/politik/eu-wirft-russland-desinformation-in-coronakrise-vor-die-kampagne-soll-verwirrung-panik-und-angst-verschaerfen/25659790.html>.

¹² Oficialajn ciferojn vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/2019-20_coronavirus_pandemic_in_mainland_China, prikomentojn vd. sub <https://www.tagesspiegel.de/politik/china-das-coronavirus-und-die-zensur-das-chinesische-krisenmanagement-zeigt-dass-die-kontrollwut-ueber-allem-steht/25570986.html>, <https://www.srf.ch/news/international/statistik-wird-zum-politikum-zweifel-an-chinas-corona-zahlen>, <https://www.tagesanzeiger.ch/ausland/asien-und-ozeanien/stimmen-die-zahlen-aus-china/story/14343145>, <https://orf.at/stories/3160117>.

¹³ Vd. <https://www.welt.de/politik/ausland/article207314631/Coronavirus-Wie-China-die-drastische-Korrektur-der-Todeszahlen-erklaert.html>.

En Ruslando, kie komence oni subpremis la informadon pri la pandemio, prezidento Putin tamen intertempe direktiĝis en la televido per seriozaj avertoj al la popolo.¹⁴ Dum Orbán kulpigis la „eksterlandanojn“ pri la krizo, Lukaŝenko parolis pri ĝenerala monda „psiĥozo“, kaj en la televido oni vidis lin ludi hokeon.¹⁵ Kontraŭ la viruso la belorusia diktatoro rekomendis al sia popolo trinki vodkon kaj saŭnumi,¹⁶ same kiel la serba prezidento Vučić konsilis al siaj civitanoj trinki brandon.¹⁷

Ĝis la fino de aprilo laŭ faritaj testoj pli ol 3 milionoj da homoj en la mondo infektiĝis per la krona viruso, sed la nombro de infektoj estas verŝajne multe pli alta, ĉar la indikoj baziĝas sur testitaj personoj. Je la 19a de aprilo nur en Eŭropo mem estis nombritaj unu miliono da infektoj. Lige kun la epidemio en kelkaj landoj okazis nekutima tragika amasmortado: Ĝis la 20a de aprilo forpasis en la mondo 167 mil homoj lige kun la pandemio, en Italio pli ol 24 mil, en Hispanio 21 mil, en Francio pli ol 20 mil, en Britio 16'500 kaj en Usono eĉ pli ol 35 mil homoj,¹⁸ kaj ankaŭ aliaj landoj registras eksterordinare pli multajn mortkazojn de homon, kiuj montris kronvirusajn simptomojn. Entute 187 landoj estas koncernataj de la pandemio. Ankaŭ Germanio, Svislando kaj Aŭstro estis konsiderinde trafataj de la epidemio, tiel ke la vivo preskaŭ komplete haltis en marto. En orienta Eŭropo la koncernaj ciferoj estas kurioze pli malaltaj ol en la okcidenta parto, verŝajne ĉar oni testas malpli da homoj ol en la okcidento.¹⁹

La realan nombron de mortkazoj kaj infektoj pro tiu viruso la homaro eble ekscios iam poste aŭ eble neniam ekscios ĝin. Post kiam la usona prezidento komence bagateligis la danĝeron de la epidemio por Usono, intertempe li ŝajnis kompreni la seriozecon de la epidemio, ŝanĝis sian sintenon rilate la virusan problemon kaj ne hezitis ŝoki la civitanojn en la televido per hororaj ciferoj: li opiniis, ke oni devos verŝajne enkalkuli 2,2 milionojn da mortontoj „kaj se ni povus malaltigi la ciferon al 100 ĝis 200 mil, ni faris bonan laboron“ (sic). La stultaj frazoj, kiujn la malkompetenta usona prezidento elpuŝis pri la pandemio,²⁰ ne estas komentindaj. Boris Johnson, la brita ĉefministro, kiu komence komence malserioze taksis la epidemion kiel la supre menciitaj ŝtatestroj, mem malsaniĝis pro la viruso kaj devas esti sendita al la hospitalo. Ruslando disponigis ampleksan helpon al norda Italio, Ĉinio kaj Usono kaj Pekino liveris cent mil spiraparatojn al Usono kaj milionojn da maskoj al Germanio. Por deflankigi de si la komencan kulpon, Pekino eĉ celas reskribi la historion de la pandemio kaj elpaŝas kiel savanto de la mondo. Sed ne nur tion. En sia klopodo influi la tutan mondon Ĉinio komencas subfosi la internaciajn organizaĵojn kiel ekzemple la Mondan Organizaĵon pri Sano (WHO), kiu laŭ 'sendependaj' esplorantoj rilatis tro malserioze al la situacio en Ĉinio, do ĉi-konkrete en rilato kun la kronvirusa pandemio, por ne ĉagreni la regantojn en Pekino, kiuj disponigas financojn al WHO. Trump tiel koleriĝis pri WHO, ke li intencas ĉesigi aŭ limigi la usonajn pagojn al ĝi.²¹

Rusa helpo al Italio: Pri la operaco „El Rusio kun amo“ kaj la skandalo en *La Stampa*

Kiam Ruslando sendis, al 24an de marto, armean helpon al Italio, kiu estis kruele trafita de la pandemio, iuj suspektis, ke Moskvo sekvas per tiu helpo probable ankoraŭ aliajn celojn ol nur helpi al la suferantaj italoj, kiuj nur malfacile majstras la virusan katastrofon. Putin, konata kiel ruza trompisto, certe kaptis la okazojn, kiuj malfermis al li taŭgajn eblojn engaĝiĝi en la tutmonda kronvirusa krizo, kiu neantaŭvideble draste eksplodis en Eŭropo. Tiel, fine de marto li sendis armean taĉmenton al Italio por apogi la solvado de la epidemio. Laŭ rusaj informoj, al la kontaminataj zonoj de Italio estis senditaj 104 rusaj helpantoj („armeaj virusologoj kaj epidemiologoj“) plus ok medicinaj teamoj kaj 600 (!) spiraparatoj kun kemiaĵoj por la desinfekciado de la koncernaj instalaĵoj en Bergamo, kie 51 rusaj fakuloj purigis hejmojn por maljunuloj kaj kie 35 kuracistoj kunlaboris kun italoj.²² La rusia televido montris publike efike, kiel grandegaj rusaj trans-

¹⁴ Vd. www.kremlin.ru.

¹⁵ Pri la situacio en Belorusio vd. https://en.wikipedia.org/wiki/2020_coronavirus_pandemic_in_Belarus.

¹⁶ Vd. <https://www.stern.de/politik/ausland/weissrussland--lukaschenko-setzt-auf-wodka-und-sauna-im-kampf-gegen-corona-9206174.html>.

¹⁷ Vd. <https://www.derbund.ch/ausland/europa/pflaumenschnaps-hilft-doch-nicht-gegen-corona/story/16026490>.

¹⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/2020_coronavirus_pandemic_in_Italy,

https://en.wikipedia.org/wiki/2020_coronavirus_pandemic_in_France,

https://en.wikipedia.org/wiki/2020_coronavirus_pandemic_in_the_United_States, <https://www.srf.ch/news/international/immer-schon-gewusst-15-trump-zitate-ueber-die-corona-krise>.

¹⁹ Vd. la koncernajn ligojn sur www.osteuropa.ch.

²⁰ Vd. <https://www.srf.ch/news/international/immer-schon-gewusst-15-trump-zitate-ueber-die-corona-krise>.

²¹ Vd. <https://www.spiegel.de/politik/ausland/coronavirus-who-weltkrankheitsorganisation-a-29c74432-aea1-4f9a-b1ff-fcc4bb43cc4e>.

²² Vd. <https://deutsch.rt.com/meinung/100370-so-funktioniert-desinformation-nato-denkfabrik>.

port-aviadiloj alteriĝis sur iu itala armea flughaveno ĉe Romo, kiel rusaj ŝarĝkamionoj sekve veturis kun flir-
tantaj rusaj flagoj sur malplenaj aŭtoŝoseoj al norda direkto.²³

La rusoj do kreis la impreson, ke ili estis ege bonvenaj en Italio, ĉar precipe en Lombardio la
sansistemo estis rande de la kolapso (kiel oni poste eksciis, en Italio estis faritaj gravaj eraroj, kiujn la itala
justico nun esploras). Por Putin, Italio estas t.n. ´mola´ celo en la NATO-landaro – oni ankoraŭ memoras la
vojaĝojn de la itala dekstrema populisto kaj opozicia gvidanto Matteo Salvini al Moskvo por kaĵoli la
Kremlon.

La rusa operaco, nomita de la Kremlo „El Rusio kun amo“,²⁴ estis gvidata de generalmajoro Sergej
Kikot,²⁵ kiu pasintjare neis la aplikon de kemiaj armiloj de la sendube altgrade krima Asad-reĝimo en Sirio,
kiun Moskvo apogas, malgraŭ la pozitivaj konstatoj de la Organizaĵo por la Malpermeso de kemiaj armiloj.
Kial do sur la scenejo en Italio devis nepre aperi ĝuste tiu rusa oficiro, kiu verŝajne disvastigis falsajn infor-
mojn pri Sirio?

El Italio baldaŭ venis la ĝojiga novaĵo, ke la rusoj sanigis kvar pacientojn. La propaganda operaco do
plene sukcesis: Rusio helpas iomete, kune kun Ĉinio, kie probable eksplodis la epidemio, al la kompatinda
Eŭropo, kiu ŝajne ne kapablas helpi sin mem (malgraŭ la enormaj monsumoj, kiuj staras je la dispono). La
humila dankemo de la italoj estis ruze ekspluatita de la propagandisma rusia televido kaj kiu faris altgrade
embarasan impreson en eksterlando. Cu la italoj estis naivaj? Laŭ TASS, en Moskvo la rusa helpo, precipe la
600 spiraparatoj, estis same dankita de la itala ambasadoro Terracciano. Esprimo de danko venis ankaŭ de la
prezidento de Lombardio, Fontana. Lia regiono estis plej forte trafita de la epidemio. Ankaŭ la itala ministro
pri eksteraj rilatoj, Di Maio, certigis sian dankemon pro la grava kontribuo de la solidareco en tiuj malfacilaj
tempoj. Por la rusoj, nur tiuj oficialaj funkciuloj estis rajtigataj paroli en la nomo de Italio. Kritikajn
ĵurnalistojn Moskvo konsideras kiel trolojn kaj disvastigantojn de falsaj informoj kaj do rifuzas aprezi ilin
kiel seriozajn fontojn de novaĵoj.

Tiuj helpemo de la rusoj kaj dankemo de la italoj fakte estis la ĉefa mesaĝo, kiun la rusa televido kaj
gazetaro celis disvastigi. Tial iuj suspektis, ke la rusoj verŝajne ne celis nur humanitaran helpon. En Italio la
rusoj povis evidenti la malfortojn de la okcidenta alianco. Krom tio, ili povis observi surloke la reagojn de
okcidenta socio, kiam ĝi estas alfrontita per tia terura epidemio, ili povis akiri sciojn pri la kronviruso, kiuj
povas utili ankaŭ en la propra lando kaj ili povis ludi rolon en la internacia politiko.

Estas klare, ke la rusa (kaj ĉina) helpo al Italio tute ne plaĉis al diversaj okcidentaj politikaj cirkloj de
EU kaj NATO. Ankaŭ la okcidenteŭropaj gazetaroj, radio- kaj televidostacioj inkluzive la svisan reagis kun
skeptiko al tiu rusa engaĝiĝo, kiun ili vidis kiel ruzan propagandan trukon de la Kremlo por kompromiti kaj
diskrediti Eŭropan Union, kiu ne povas aŭ ne volas helpi al sia itala membro (kaj kiu tamen disponigis
miliardojn da eŭroj por helpi solvi la problemojn de la pandemio).²⁶ Cetere, ankaŭ multaj italoj havis la
impreson, ke la aliaj EU-landoj ne sufiĉe multe helpas al ilia lando. Intertempe, en Italio la reputacio de
Ĉinio kaj Ruslando multe kreskis malfavore al Germanio kaj EU.²⁷ Donald Trump multe laŭdis la ĉinan kon-
tribuon en la kontraŭvirusa batalo kaj nomis la rusan helpon „ĝentila dankinda gesto“, antaŭ ol li akre kritikis

²³ Raportojn kun la koncernaj komentoj en la rusia televido vd. ekzemple <https://www.youtube.com/watch?v=WqlsiHqImdc>,
<https://www.youtube.com/watch?v=KIdish-HY38>, <https://www.youtube.com/watch?v=3QvUrVfsKyU>.

²⁴ Vd. <https://www.tagesschau.de/investigativ/russland-italien-corona-101.html>, <https://www.bbc.com/news/world-europe-52137908>;
<https://www.forbes.com/sites/isabeltogoh/2020/03/26/from-russia-with-love-putins-medical-supplies-gift-to-coronavirus-hit-italy-raises-questions/#5501e84a4a47>.

²⁵ Vd. <https://www.codastory.com/disinformation/soft-power/russia-coronavirus-aid-italy>.

²⁶ Ekzemple: <https://www.tagesschau.de/investigativ/russland-italien-corona-101.html>, <https://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/in-italien-waechst-kritik-an-russischer-corona-hilfe-16699922.html>, <https://www.zeit.de/politik/ausland/2020-04/italien-eu-corona-bonds-angela-merkel>, kiu timas, ke Matteo Salvini povus politike profiti,

<https://www.handelsblatt.com/politik/international/wladimir-putin-darum-unterstuetzt-russland-italien-in-der-coronakrise/25675610.html?ticket=ST-79961-YzwFnIleZfpvZwN0IB4-ap2>,

<https://www.welt.de/politik/ausland/plus206869155/Corona-Hilfe-Putzkolonnen-aus-Moskau.html>, kiu misfamigis la helpantojn el Ruslando kiel „purigajn kolonojn el Moskvo“, aŭ <https://www.bild.de/politik/ausland/politik-ausland/corona-krise-wie-die-afd-putins-militaer-in-italien-einschleuste-69638656.bild.html>. Laŭ tiu ĉi artikolo, la dekstrema germana opozicia partio AfD iniciatis la rusan helpon al Italio. Ankaŭ NZZ parolis pri Putin-propagando, vd.

<https://www.nzz.ch/international/coronavirus-italien-putins-propaganda-mit-hilfsaktion-in-bergamo-ld.1551922?mktcid=nled&mktcval=102&kid=2020-4-16&trco=>.

²⁷ Laŭ *Berlin direkt* de la 26a de aprilo 2020.

la ĉinojn kiel mensogantojn. Sed la ĉinoj jam delonge misutiligis la laŭdojn de Trump por la propra enlanda propagando

La torina gazeto *La Stampa* ne hezitis klasifiki la helpon de la rusa armeo kiel operacon de la rusa sekureca servo, kiu laŭ ĝi estas pli danĝera ol utila por Italio, des pli ke grandparto de la alportita materialo el Ruslando, nome 80 procentoj, estis laŭdire neutiligebla, kiel skribis la koncerna ĵurnalisto en sia artikolo.²⁸ Ĉu la materialo estis malnova aŭ malbonkvalita? Nu, la rusoj sendis unuavice kamionojn, soldatojn kaj materialon, kiun la itala armeo esence estus povinta disponigi mem.²⁹

Tagojn poste, Oliver Carroll, moskva korespondanto de la londona gazeto *Independent*, ripetis la mesaĝon de *La Stampa*, ke „80 procentoj de la rusaj liveraĵoj estis senutilaj“, en Tvitero. La sama aserto estis disvastigita de Eto Busiaŝvili, Olga Tokariuk kaj Dionis Cenusa, kunlaborantoj de la ‘fifama’ „Atlantika Konsilio“,³⁰ kiu estas ‘pensfabriko’ proksima al NATO kaj, laŭ rusa aserto, financata de armeaj konzernoj kaj investfondaĵoj kiel Black Rock. Kiel la novaĵagentejo *Rusio Hodiaŭ*, kiu siaflanke estas proksima al la Kremlo kaj komparas sin, kiel kompletigan servon en la germana gazetara pejzaĝo, kun la *Germana Ondo*,³¹ eltrovis, Busiaŝvili mem konsideras sin „fakulino pri falsa informado“, kiel la kartvelino skribis pri si mem. Ĉar Tokariuk estas ĵurnalistino de opozicia ukraina amaskomunikilo, flanke de Rusio oni konkludis, ke malantaŭ la kampanjo de *La Stampa* troviĝas malamikoj de Ruslando.³²

Dum sia esplorado *Rusio Hodiaŭ (RT)* ankaŭ malkovris, ke la itala ĵurnalisto Jacopo Iacoboni mem verkis por „Atlantika Konsilio“. ³³ Do, por Moskvo ĉe ĵurnalistoj ligitaj kun „Atlantika Konsilio“ temas pri nenio alia ol pri tuta armeo de okcidentaj trojoj, kies tasko estas fari informan militon kontraŭ Ruslando kaj disvastigi falsajn novaĵojn en la nomo de NATO. Ivan Rodionov, la ĉefredaktoro de *RT* en la servo de la Kremlo, konsideras tiujn ĵurnalistojn nuraj lakeoj de la okcidenta, precipe de la usona propagando kontraŭ Ruslando, malantaŭ kiu staras George Soros kaj similaj homoj.³⁴ Ankaŭ „eŭgenikistoj“ kiel Bill Gates estas stilizataj de rusiaj amaskomunikiloj kiel malamikoj, ĉar la defendantoj de konspiraj teorioj suspektas, ke la eksa ĉefo de Microsoft volas gvidi la homaron per speciala ĉipo, kiu estu enplanita en la cerbojn de la homoj.³⁵ Ĉi tiu mesaĝo estis disvastigita de la araba kanalo de *RT*, tiel ke ankaŭ la tuta araba mondo informiĝis pri tiu dubinda afero.³⁶ Homoj kiel Soros kaj Gates estas metitaj en la angulon de CIA kaj de la framasonoj – mankas nur la judoj, kion tiuj kanaloj evitas por eviti la akuzon de la antisemi-tismo. Oni do ne plu scias, ĉu tiuj famaj riĉuloj estas filantropoj aŭ ruzaj komercistoj.

Por reveni al la artikolo en *La Stampa*, la spekulativaj asertoj ne estis finitaj. Oni demandis sin, ĉu la Kremlo eble provis gajni la favoron de la itala registaro por influi la nuligon de la sankcioj. Krome, oni vidis problemon en tio, ke Ruslando sendis fakulojn pri nuklea, biologia kaj kemia defendo al Italio, inter kiuj povis esti spionoj. La paralelo inter la alveno de rusaj armeanoj en Italio por helpi en la epidemio kaj la invado de la sovetia armeo en Afganion en la jaro 1979 tamen estis troigita, kvankam la veturado de rusaj armeaj kamionoj sur italaj aŭtoŝeoj eble aspektis kiel invado de la rusa armeo.

Al la asertoj kaj aludoj en la artikolo de *La Stampa* reagis kun ĉagreno la rusa ambasadoro en Italio, Razov,³⁷ kiu riproĉis al la itala ĵurnalisto, ke li disvastigis falsajn informojn (sic) kaj forgesis, ke la rusoj, kiuj engaĝiĝas en la koncerna norditala regiono, riskas sian sanon.³⁸ Ankaŭ la oficiala parolisto de la rusia ministerio de la defendo sentis sin devigita plendi. Dum la ambasadoro ankoraŭ restis sufiĉe ĝentila, la parolisto de la rusia ministerio de la defendo akuzis en sia ekscesa reago, aperinta en *La Stampa*, la italan gazeton, ke

²⁸ Vd. <https://www.lastampa.it/topnews/primopiano/2020/03/25/news/coronavirus-la-telefonata-conte-putin-agita-il-governo-piu-che-aiuti-arrivano-militari-russi-in-italia-1.38633327>.

²⁹ Vd. <https://www.rbb-online.de/kontraste/archiv/kontraste-vom-16-04-2020/wie-russland-mit-propaganda-die-eu-spalten-will.html>.

³⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Atlantic_Council.

³¹ Vd. <https://www.tagesspiegel.de/gesellschaft/medien/chefredakteur-ivan-rodionov-im-interview-rt-deutsch-wir-sind-gefahrlich/11534566.html>.

³² Vd. ankaŭ <https://euvsdisinfo.eu/report/ukrainian-russophobes-behind-la-stampas-anti-russian-disinformation-campaign>.

³³ Ekzemple li kunlaboris en la fama raporto „La trojaj ĉevaloj de la Kremlo 2.0“, vd. <https://css.ethz.ch/en/services/digital-library/publications/publication.html/de3b5304-0cd3-49c5-aa41-a91b6d0f400d>.

³⁴ Vd. <https://deutsch.rt.com/meinung/100370-so-funktioniert-desinformation-nato-denkfabrik>.

³⁵ Vd. <https://www.tagesschau.de/faktenfinder/feindbild-gates-101.html>.

³⁶ Vd. <https://euvsdisinfo.eu/pro-kremlin-classics-and-rt-arabic-featuring-bill-gates>.

³⁷ Vd. <https://www.lastampa.it/2020/03/26/news/la-lettera-dell-ambasciatore-russo-razov-a-la-stampa-1.38642247>.

³⁸ Tio estas vera. Sed nekonate estas, kiuj estis tiuj homoj, kiuj veturis al Italio: ĉu ili estis libervoluloj aŭ devigitaj de la registaro, kiu estis ilia sorto: ĉu ili dume reveturis al Ruslando aŭ restis en Italio? Ĉu ĉiuj restis vivaj? Ktp.

ĝi celas nenion alian ol senkreditigi la rusan helpagadon, aplikante kontraŭrusan sintenon kaj uzante plej krudajn metodojn de la kontraŭ-sovetia propagando el la tempo de la Malvarma Milito.³⁹ La konsternata itala ĉefministro Conte oficiale rifuzis ĉiajn akuzojn kaj suspektojn kontraŭ Rusio, kaj Romo denove kaptis la okazon por varme danki pro la rusa helpo kun la certigo, ke tia kritiko signifas ofendon por li kaj por Putin persone (sic). Laŭ Conte, la kritikantoj multe tro konsideris kaj interpretis la helpon de la rusoj kaj ĉinoj en la senco de geopolitika strategio.⁴⁰ Pri la artikolo en *La Stampa* ne silentis ankaŭ la rusa ministro pri eksteraj rilatoj, Lavrov, mem, kiu estas fifame konata pro sia cinika maniero esprimi sin. Li komentis, ke ŝajne ekzistas homoj, kiuj celas fari el la rusa engaĝiĝo preskaŭ armean invadon sur la teritorio de NATO kaj EU. Li rememorigis la fakton, ke estis Conte mem, kiu petis helpon de Putin,⁴¹ *kiu telefonis al li*,⁴² aldonante, ke Ruslando tute ne intencas peti de Italio la nuligon de la sankcioj, kiujn EU enkondukis pro la rusa interveno en Ukrainio.⁴³

Kiel ajn oni pensas pri la rusa engaĝiĝo en Italio, estas saĝe kaj ĝuste konsideri ĉiun tian operacon el Rusio per sana skeptiko, ĉar oni ja konas la senfinajn propagandajn trukojn kaj mensogojn, kiuj estas produktitaj kaj disvastigitaj en tiu lando kaj en kies kaptilojn falas tiom multaj homoj en la tuta mondo. Prave do ekzistas la suspekto, ke Putin povus misuzi la aktualan kronvirusan krizon por politikaj celoj kaj la propagando en la propra lando. Ankaŭ la redakcio de *La Stampa* prikomentis la skandalon tiel, ke en Italio efektive ekzistis politikaj duboj pri la sincereco de la rusa helpo, kiuj estis subtenataj de italaj armeaj kaj sekretservaj medioj de la lando. Kvankam oni bedaŭris, ke tiu dimensio de la opinia libereco ĉagrenis la rusajn helpantojn, la redakcio tamen atentigis pri la libereco de la opinioj en Italio kaj protektis la koncernan ĵurnaliston kontraŭ la „neakceptebla atako“ el Moskvo. Cetere, la ĵurnalista klarigis, ke la farita aserto pri la neuzbla rusa materialo estis ĉerpita de anonima „altranga registara fonto“,⁴⁴ do ne venis de li mem, kaj admonis, ke diktoj kaj minacoj de fremdaj potencoj al la adreso de liberaj ĵurnalistoj ne estas akcepteblaj.⁴⁵

Ŝtata cenzuro alergias pri „alternativaj faktoj“

Estus interese scii, ĉu la ruslandanoj ĝenerale kredas kaj fidas aŭ ne la informojn kaj statistikojn, kiujn la aŭtoritatoj de la Kremlo publikigas pri la kronvirusa pandemio. Kiel nerveze reagis la rusaj instancoj, se aktivuloj de la civilsocio disvastigas kritikajn informojn ekster la kontrolo de la Kremlo, montras la kazo de Anastasija Vasileva: Post kiam la prezidantino de la „sendependa sindikato de sankonservaj laboristoj ‘Alianco de kuracistoj‘“, raportis en la interreto pri problemoj en la hospitaloj, kie mankas materialoj por protekti la personaron, kaj asertis, ke la aŭtoritatoj kaŝas informojn pri la reala nombro de homoj, kiuj malsaniĝis je la krona viruso en Moskvo, ŝi estis vokita de la respondeca esplor-komitato (komparebla kun kriminala polico), kiu suspektis ŝin pro disvastigo de falsaj informoj. Oni riproĉis al ŝi, ke ŝi „provokas panikon en la socio“ kaj petis ŝin denunci la kuracistojn, kiuj plendis pri la laborkondicoj aŭ lezis la regulojn (kion ŝi rifuzis fari).⁴⁶ Laŭ Vasileva, la polico klopodis silentigi ŝian sindikaton.⁴⁷ Sed ankaŭ la ĉina cenzuro nerveze reagis al sendependaj informoj en la internacia interreto, kiu estas severe subpremata de la ĉina registaro, kaj kutimas tuj forviŝi ilin, se ili aperas en tiu kanalo, ĉar oni volas eviti panikon en la popolo.⁴⁸ La plej fifama kazo de cenzura ĉikanado en Ĉinio lige kun la eksplodo de la virusa epidemio estis la reprezalioj kontraŭ la kuracisto Li Wenliang, kiu estis devigita prisilenti la aferon, ĉar li avertis sian ĉatgrupon en la interreto pri sep pacientoj, kiuj estas traktataj en la centra hospitalo de Vuhano pro suspekto pri tiu nova kronviruso, kiu evidente aperis en iu fifama best-merkato de tiu urbeĝo. La 1an de januaro 2020 la ŝtata novaĵagentejo Xin-

³⁹ Vd. <https://www.lastampa.it/lettere/2020/04/03/news/le-accuse-di-mosca-e-la-nostra-risposta-1.38672825>.

⁴⁰ Vd. <https://www.derbund.ch/es-ist-unbestritten-italien-war-allein-210611475624>.

⁴¹ Laŭ Conte, la rusoj mem proponis la helpon.

⁴² Vd. <https://deutsch.rt.com/meinung/100370-so-funktioniert-desinformation-nato-denkfabrik>.

⁴³ Vd. <https://www.lastampa.it/topnews/primo-piano/2020/04/15/news/lavrov-aiuti-chiesti-da-conte-e-roma-non-cambia-linea-grati-a-chiunque-ci-sostenga-1.38717967>; <https://www.nzz.ch/international/coronavirus-italien-putins-propaganda-mit-hilfsaktion-in-bergamo-ld.1551922?mktcid=nled&mktcval=102&kid=2020-4-16&trco=>

⁴⁴ Vd. <https://de.sputniknews.com/panorama/20200328326721234-autor-des-artikels-ueber-nutzlose-russische-hilfe-erklaert-sich>.

⁴⁵ Vd. <https://www.rbb-online.de/kontraste/archiv/kontraste-vom-16-04-2020/wie-russland-mit-propaganda-die-eu-spalten-will.html>.

⁴⁶ Vd. <https://www.kommersant.ru/doc/4309590>.

⁴⁷ Vd. <https://twitter.com/DrAnastasy/status/1242456184067698689>; <https://www.spiegel.de/politik/ausland/corona-pandemie-ploetzlich-nimmt-auch-wladimir-putin-das-virus-ernst-a-c2589502-b89f-4d5e-8f67-5fed68b66e85>.

⁴⁸ Ĉinio kurioze havas propran internan interreton, kiu estas fermita al la ekstera internacia interreto, kiu estas atingebla nur pere de tekika perilo je la propra risko de la uzantoj (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Internet_in_China, https://en.wikipedia.org/wiki/Internet_censorship_in_China).

hua komunikis, ke en Vuhano ok personoj estis punjure persekutataj, ĉar ili disvastigis falsajn informojn (sic) en la interreto. Malfeliĉe, Li Wenliang mem malsaniĝis pro la viruso kaj mortis la 7an de februaro.⁴⁹ Alia grava ĉina kritikisto, kies moknomo „Granda kanono“ oni devas koni, estas Ren Zhiqiang, la iama ‘caro’ de la komercado per senmoveblaĵoj. Li ekhavis konflikton kun la sekurecaj aŭtoritatoj pro sia kritika sinteno rilate al la ĉina prezidento mem, pri kiu li dubas, ke li estas vera heroo, kiel oni prezentas lin, kaj estas nun jure esplorata de la „Centra Disdisciplina Inspekta Komisiono“.⁵⁰ Kiel oni vidas, en certaj komunismaj kaj post-kunismaj landoj la oficialaj instancoj alergie reagis kontraŭ kritikemaj aktivuloj per juraj reprezalioj kaj verŝajne ankaŭ per nesufiĉe honesta raportado, kaŝado kaj prisilentado de esencaj faktoj kaj per senskrupula reskribado de la historio.⁵¹ La diferenco de tiuj landoj estas, ke en Usono tia demagogia prezidento kiel Trump, kiu estas, kiel konate, malamiko de ĉiuj demokratiaj strukturoj kaj kritikaj ĵurnalistoj, tamen ne povas kaŝi la realajn ciferojn kaj faktojn, kiujn li klasifikas kiel „alternativajn faktojn“ kaj „falsajn novaĵojn“. Kiam Trump estis petita komenti raporton de la usona sekreta servo, ke Ĉinio falsis la ciferojn, li levis la ŝultrojn, sarkasme dirante: „Mi ne estas librotenisto el Ĉinio“. La novaĵagentejo *Bloomberg* certas, ke la ĉinaj ciferoj estas „falsaj“, kaj *New York Times* aldonis, ke la ĉina registaro verŝajne mem ne konas la realajn ciferojn.⁵²

Alia sekvo de la pandemio estas enorma krizo de la ekonomio, kiu estas ligita kun kolapso de sen-nombraj entreprenoj kaj milionoj da novaj senlaboruloj tutmonde. Ekzemple en Usono ĉiu deka laboristo perdis sian laborlokon. Eŭropa Unio (EU) liberigis la sumon de 500 miliardoj da eŭroj kiel financa helpo por mildigi la krizon, sed tiu mono ne sufiĉos, se la pandemio daŭros pli longe. Oni do vidas, ke la temaro estas ampleksa kaj interrilata. Fine de la diskuto do leviĝas ankaŭ la demando, kiu kulpas pri la eksplodo de la plej aktuala pandemio, se ne Ĉinio, kie jam en 2002 eksplodis la fifama SARS-epidemio, kun pli malmultaj viktimoj.⁵³ Nature, Ĉinio rigore rifuzas ĉian kulpon. Laŭ sciencistoj, la krona viruso estis trovita ĉe vespertoj, de kiuj ĝi saltis tra aliaj bestoj al la homo...

Moskvo apogas Pekinon rilate la kulpigon de Ĉinio pri la pandemio

Estas senutile akuzi Ĉinion per la riproĉo, ke ĝi ne informis la mondon ĝustatempe pri la infektoj, avertis la Kremlo post telefona interparolado de Vladimir Putin kaj lia ĉina kolego Xi Jinping la 16an de aprilo. Oni emfazis, ke ambaŭ landoj subtenas unu la alian en la venkado de la kronviroza krizo, precipe rilate medicinajn aparatojn, medikamentojn kaj protektan materialon, kiuj estas liverataj al Ruslando. Al Ĉinio iuj landoj riproĉas, ke Pekino kaŝis la eksplodon de la epidemio en la ĉina urbego Vuhano en la komenca fazo kaj ke ĝi malbonigis la situacion en la mondo per disvastigo de falsaj informoj. Diversaj usonaj amaskomunikiloj raportis, citante konojn de la usona sekreta servo, ke la nova krona viruso eble originas el esplor-laboratorio en Ĉinio, nome el la fama Virusologia Instituto en la sudo de Vuhano. La usonanoj atendas de Ĉinio ĉirilatajn respondojn kaj klarigojn. La usona televida stacio Fox disvastigis tiun hipotezon, referencante nenomatajn fontojn. Intertempe, la estro de tiu instituto klare rifuzis ĉi-koncernajn riproĉojn el Usono.⁵⁴ Nun CIA mem volas esplori la aferon, ĉar la usonanoj ne kredas la asertojn de la ĉinoj. Internaciaj fakuloj daŭre kredas, ke la viruso havas sian devenon en konkreta bestmerkato en Vuhano, kie estis observataj ankaŭ la unuaj kronvirusaj malsaniĝoj.⁵⁵ Sed ankaŭ ĉi tiu kazo montras, ke Moskvo kaj Pekino kune defendas sin rilate al la akuzoj el Okcidento.⁵⁶ Fakte, ĉe ĉiuj tiuj asertoj kaj diskutoj temas pri nuraj spekulativoj. La eŭropanoj preferas esti neŭtralaj en la kverelo rilate la devenon de la viruso kaj atendas findindajn sciencajn informojn por

⁴⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Li_Wenliang. La tuta historio estis rekonstruita en ĉi-koncerna artikolo en Spiegel 20/2020.

⁵⁰ Vd. <https://www.nzz.ch/international/coronavirus-die-kp-chinas-geht-gegen-kritiker-ren-zhiqiang-vor-ld.1550912>, <https://www.nytimes.com/2020/03/14/world/asia/china-ren-zhiqiang.html>; https://en.wikipedia.org/wiki/Ren_Zhiqiang.

⁵¹ Pri la mondskala cenzurado de la interreto Vikipedio disponigis artikolon atingebla sub https://en.wikipedia.org/wiki/Internet_censorship.

⁵² Vd. <https://www.spiegel.de/politik/ausland/corona-faelle-in-china-pekings-zweifelhafte-zahlen-a-295ef443-5df3-406b-acff-360746eb27be>. La 17an de aprilo Ĉinio sciigis, ke en Vuhano mortis 1290 pli da homoj ol ĝis nun estis konate (vd. <https://www.tagesschau.de/ausland/china-wuhan-109.html>)

⁵³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Severe_acute_respiratory_syndrome.

⁵⁴ Vd. <https://www.tagesschau.de/ausland/corona-china-labor-101.html>.

⁵⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Schweres_akutes_Atemwegssyndrom. Kiaj bestoj en tiu merkato estis venditaj vd. <https://www.handelszeitung.ch/panorama/solche-tiere-wurden-auf-dem-markt-wuhan-verkauft>.

⁵⁶ Vd. <https://www.cash.ch/news/politik/coronavirus-russland-stellt-sich-nach-schuldzuweisung-hinter-china-1525796>.

povi pruvi ĝian originon, diris Josep Borrell, EU-komisiito pri eksteraj rilatoj en intervjuo kun Euronews la 9an de majo.⁵⁷

Dubinda ŝonglado per ciferoj en Ruslando

La nombro de infektoj dume rapide kreskis ankaŭ en Rusio. Ĝis la 27a de aprilo estis registritaj tutlande 87'000 kazoj de infektoj per la Sars-CoV-2-viruso. Ĝis tiam mortis 794 homoj.⁵⁸ La 30an de aprilo oni eksciis, ke la rusia ĉefministro Miŝustin, kvazaŭ sur la kulmino de la pandemio en Ruslando, mem infektiĝis per la krona viruso.⁵⁹ Dum la pandemiaj ciferoj reduktiĝis en aliaj partoj de la mondo, en Ruslando ili restis ege altaj: La 20an de aprilo estis registritaj 6 mil novaj infektoj.⁶⁰ En majo Ruslando registris ĉiutage 10'000 novajn infektojn, dum la mortkazoj restis relacie malaltaj. Tio kaŭzis internacian miradon kaj suspekton kontraŭ Ruslando, pri kiu oni kredas, ke ĝi manipulas kaj falsas la ciferojn kiel kutime. La gazetoj, kiuj raportis pri tiu afero, nome *New York Times* kaj *Financial Times*, ricevis furiozajn leterojn de la rusa ministerio de la eksterlandaj aferoj, en kiuj oni riproĉis al tiuj gazetoj „misinforman kampanaĵon“ kaj provon „malstabiligi la situacion“. Nu evidentiĝis, ke la problemo estas, ke Ruslando alimaniere nombras la mortintojn en la kunteksto de la kronvirusa panedemio ol en okcidentaj landoj oni kutimas fari tion. La rusoj ne aŭtomate konsideras kronvirusajn infektitojn post ties morto kiel viktimojn de la viruso. Oni asertis, ke la mortkaŭzo estas precize esplorata per obdukcio. Post tio gravas la opinio de la patologo, ĉu entute temis pri malsaniĝo pro la krona viruso kaj ĉu ĝi estis pli decida por la morto de la forpasinta paciento ol aliaj malsanoj. En Moskvo oni komunikis, ke en pli ol 60 procentoj de la mortkazoj, kiuj estis registritaj en la tempo, kiam la krona viruso furoris, estis konstatita evidente alia kaŭzo de la morto, pro kio estis pubikigitaj pli malaltaj ciferoj ol atendite. En okcidentaj landoj oni ofte konkludis, ke ies morto okazis *lige kun* aŭ *sekve al* la krona viruso. Oni do povas paroli pri du diversaj 'skoloj' de la diagnozado kaj nombrado. Sed ambaŭ usonaj gazetoj estas konvinkitaj surbaze de sciigoj el Ruslando, ke tiu sistemo estas desupre gvidata laŭ la ĉeno ministerio de la sano – regionoj – ĉefkuracisto – patologo, kiu finfine notas, kion oni postulas de li. Verŝajne okazas ĝuste tiu maniero de diagnozado kaj nombrado. La novaj agentejo Meduza eksciis de patoloĝoj, kiuj staris sub premo, ke oni postulis de ili eviti Kovid-19-rilatajn diagnozojn. Sed ĉar la nombro de mortintoj en Ruslando ĉiukaze estas pli malalta ol en aliaj landoj, oni supozas, ke ekzistas ankoraŭ aliaj kaŭzoj de la pli malalta morteco en Ruslando, ekzemple la rigoraj kontraŭvursaj rimedoj de la ŝtato, la relative malmultaj hejmoj por maljunuloj, la pli mallonga vivodaŭro de la rusoj k.a.⁶¹

Krom falsaj informoj, inter konspiristoj okazas eksceso, kaj tabuoj estas rompita, ekzemple en Germanio, kie la nova naziismo kaj faŝismo konsiderinde progresis kaj kreskis en la pasintaj jaroj. Ĉe la neantoj de la kronvirusa krizo la bona konduto estas pli kaj pli lezata. Kun blinda kolero oni retorike pafas kontraŭ la registaro, diversaj politikistoj kaj sciencistoj, kiuj reprezentas gvidajn opiniojn pri la kronvirusa pandemio, kaj ne hezitas fari krudajn ofendojn, kalumniojn kaj komparojn kontraŭ ili, kiuj estas ŝokaj kaj neniel akcepteblaj. En la reto aperis afiŝo, kiu komparas la faman berlinan virusologon Christian Drosten kun kuracisto de nazia koncentrejo de la tipo Mengele kaj kun militkrimulo. Okaze de la novtipaj „higienaj manifestacioj“ furiozaj homoj elŝprucas sian koleron kontraŭ respondecaj politikistoj, kiuj engaĝiĝas en la batalo kontraŭ la kronvirusa pandemio. En tio rolon ludas krom Bill Gates ankaŭ judaj financistoj, kiuj laŭ tiuj homoj regas la mondon.⁶² Do, malnovaj, bone konataj stereotipoj reaperas, kvankam oni iam kredis ilin mortaj en Germanio. Anstataŭ Merkel, Spahn kaj Söder oni festas dubindajn figurojn kiel Xavier Naidoo, Attila Hildmann kaj Ken Jebsen,⁶³ kiuj disvastigis ksenofobiajn, homfobiajn kaj antisemitismajn poziciojn, pri

⁵⁷ Vd. <https://de.euronews.com/2020/05/08/josep-borrell-das-coronavirus-verscharft-die-ungeordnete-welt>.

⁵⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/2020_coronavirus_pandemic_in_Russia.

⁵⁹ Vd. <https://www.spiegel.de/politik/ausland/coronavirus-russischer-regierungschef-michail-mischustin-mit-sars-cov-2-infiziert-a-27d07275-3fa7-420b-b9b3-1c3ef6afd651>, <https://www.spiegel.de/politik/ausland/coronavirus-russischer-regierungschef-michail-mischustin-mit-sars-cov-2-infiziert-a-27d07275-3fa7-420b-b9b3-1c3ef6afd651>.

⁶⁰ Vd. <https://www.toponline.ch/news/schweiz/detail/news/zahl-der-neuansteckungen-ruecklaeufig-tourismus-leidet-00132747>.

⁶¹ Vd. <https://www.spiegel.de/politik/ausland/corona-virus-russlands-zahlenraetsel-a-1c33ab24-50db-41d0-892f-471a8e7f9223>.

⁶² Vd. https://www.derwesten.de/panorama/vermischtes/corona-christian-drosten-aufkleber-zeigt-ekelhaften-vergleich-ich-bin-mal-kurz-kotzen-id229170856.html?utm_source=browser&utm_medium=push-notification&utm_campaign=cleverpush.

⁶³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Xavier_Naidoo, https://de.wikipedia.org/wiki/Attila_Hildmann, https://de.wikipedia.org/wiki/Ken_Jebsen.

Björn Höcke, Andreas Kalbitz, Alexander Gauland kaj Alice Weidel⁶⁴ de la partio, kiuj vekis vastan atenton pro siaj dekstrismaj sloganoj, ni tute ne parolu. Kien ĉiuj tiuj ekscesoĵ kon-dukos en la politiko kaj socio, ankoraŭ ne estas antaŭvidebla aŭ prognozebla. Ŝajnas, ke tiu radikaliĝo en Germanio kreskas de jaro al jaro, tiel ke oni jam faris komparojn kun la situacio en la vejmara tempo.

Distribuita de www.planlingvoj.ch kaj www.osteuropa.ch, aprilo/majo 2020.

⁶⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Björn_Höcke, https://de.wikipedia.org/wiki/Andreas_Kalbitz, https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Gauland, https://de.wikipedia.org/wiki/Alice_Weidel.